

Nova provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia
Numero 5

Junio 1993

La temo de tiu ĉi numero estas la propono pri lingvopolitiko proponata al la Komitato de UEA fare de la ĝenerala sekretario de la Asocio, Ian Jackson. Kiel mi rimarkigas en mia letero al la komitatanoj (vidu paĝon 43), kvankam tiu propono estas malsatata de ĉiu oficisto en la Centra Oficejo, kaj kvankam la Estraro petis ŝanĝojn en ĝi dum sia februara kunsido, s-ro Jackson tamen akceptis neniun el la proponitaj modifoj. Sen ajna ŝanĝeto, la propono jam iris poŝte al la komitatanoj, kune kun aliaj dokumentoj senditaj de la CO al ili por konsidero kaj decido dum la Universala Kongreso en Valencio, 24-31 julio ĉi-jare.

Lasante la interesan demandon pri kial s-ro Jackson tiel agas, ni devas demandi kiel li kredas ke lia sensanĝa propono havas ŝancon je akcepto. Ne eblas esti certa pri tio, sed tre povas esti pro tio ke (laŭ propra diro) li zorgis prepari ĝin konforme al sia takso pri la deziro de la plimulto el la membroj de UEA. La averaĝa komitatano, li eble kredas, trovos ĝin pli alloga kaj akceptebla ol faris la oficistoj kaj estraranoj.

*Plej interesa al ni, reformistoj kaj membroj de Novo, estas paragrafo 5 de la propono: “. . . La Asocio okupiĝas nek pri projektoj reformi Esperanton (ĉu ortografie ĉu alie) nek pri aliaj planlingvoj. **Persono, kiu ligas la nomon de UEA al iu tia projekto, planlingvo aŭ okupo, morale damaĝas la Asocion.**” Tiu kiu “morale damaĝas la Asocion” povas esti, laŭ la Statuto de UEA, eksigita de membreco. Do, s-ro Jackson ne nur provas malakceptigi nian aliĝpeton eĉ antaŭ ol ni prezentas ĝin, sed cetere minacas forpeli nin de la organizaĵo se ni nur publike mencias la eblon!*

Eble indas informi, ke s-ro Jackson pravigas sian kontraŭreformistan agadon surbaze de plendoj kiujn li ricevis de UEA-membroj. Sed tiuj plendoj, kiam la vero estas sciata, sumiĝas je precize du. La identeco de unu el tiuj du ne estis konigita, sed la alia montriĝis esti viro pri kiu mi prefere diru nenion, krom ke liaj motivoj estas ege dubindaj al tiuj kiuj konas liajn agojn dum la lastaj jaroj. Mi emas suspekti ke la unua povus esti Bernard Golden, kiu verkis dekojn da fervoraj artikoloj kontraŭ Novo, kaj tiel tre povus esti skribinta ankaŭ al ĉefo aŭ ĉefoj de UEA.

Same kiel s-ro Jackson ŝajne atendas ke la Komitato ŝatos kaj akceptos lian lingvopolitikon, mi atendas ke vi, la novistoj, malŝatos kaj malakceptos ĝin. Se estas tiel, bonvolu ekagi por certigi ke nek tiu ĉi propono, nek io simila, estos akceptita de la Komitato en Valencio. Kiel rimedon kontraŭ tiu eventualo, mi proponas ke ĉiuj ni senprokraste kontaktu niajn respektivajn komitatanojn kaj provu persvadi ke tiu lingvopolitiko ne reprezentas la volon de la membroj de UEA, nek prezentas ion krom malbonon por la Asocio, kiu evidente devas esti pligrandiganta sian membraron anstataŭ forpelanta nunajn kaj estontajn subtenantojn. Listo de la komitatanoj el la landoj de la nunaj novistoj troviĝas sur paĝo 42 de tiu ĉi numero; la kompleta listo troviĝas en la Jarlibro de UEA. Ne perdu la okazon defendi lingvan liberalismon ĉe la plej granda kaj konata internacilingva asocio en la mondo. Lasu vian voĉon esti aŭdata; konigu vian senton al viaj reprezentantoj en la Komitato.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO LINGVOPOLITIKO

(propono de 24 februaro 1993)

A. ĜENERALE

1. Statuso

La lingvopolitiko de UEA indikas la startpunkton de la Asocio. Ĉiu oficohavanto de UEA devas en la plenumo de sia ofico respekti tiun politikon.

2. Apliko

Pri la apliko de la lingvopolitiko de UEA respondecas la estrarano pri lingvaj aferoj.

3. Nomo *Esperanto*

Esperanto ne estas la sola internacia lingvo, tamen ja la plej taŭga. Ĝia nomo klare distingas ĝin de la naciaj lingvoj kaj de la aliaj planlingvoj; cetere, tiu nomo ĝuas vastan publikan rekonon. UEA ne akceptas alinomigon de Esperanto.

4. Oficiala lingvo

Laŭstatute, Esperanto estas la oficiala lingvo de UEA. Tio signifas, ke la tuta interna funkciado de la Asocio okazas ekskluzive en Esperanto. Oficohavanto de UEA uzas nacian lingvon en la plenumo de sia ofico nur tiam, kiam li/ŝi traktas kun neesperantisto. La fakto, ke pluraj oficohavantoj scipovas saman nacian lingvon, ne permesas al ili konsenti inter si deflankiĝon de tiu principo.

B. FUNDAMENTO KAJ AKADEMIO

5. Fundamento

UEA akceptas neniun ŝanĝon en la *Fundamento de Esperanto*. La Asocio okupiĝas nek pri projektoj reformi Esperanton (ĉu ortografie ĉu alie) nek pri aliaj planlingvoj. Persono, kiu ligas la nomon de UEA al iu tia projekto, planlingvo aŭ okupo, morale damaĝas la Asocion.

6. Akademio

UEA agnoskas, ke la Akademio de Esperanto estas la supera protektanto de la *Fundamento*; ankaŭ aŭtoritata kontrolanto pri la evoluo de la lingvo. UEA kunlaboras kun la Akademio en spirito de reciproka estimo. UEA kontribuas al la Akademio finance, konsultas ĝin en okazo de necerto pri iu lingva demando kaj disponigas spacon en la revuo *Esperanto* por raportoj pri ĝiaj laboroj.

C. LINGVA DISVOLVADO

7. Terminologio

Terminologia disvolvo estas strategia prioritato de UEA. Esperanto ne povos realigi sian potencialon kiel universala helplingvo, ĝis ĉiu faka nocio esprimebla en nacia lingvo estos samprecize esprimebla en Esperanto. Jen la fincelo, al kiu UEA direktas sian terminologian agadon.

8. Terminologia Esperanto-Centro

Terminologia Esperanto-Centro (“TEC”), integra parto de UEA, okupiĝas pri la evoluiga lingvoprogramo de la Asocio. TEC funkcias kadre de la laborplano de UEA pri lingvaj aferoj kaj respondecas al la Estraro.

9. Lingvouzo

Individua lingvouzo estas intense persona afero kaj UEA ne povas, kaj ne volus, dikti iun lingvaĵon al siaj membroj. Aliflanke, oni facile konstatas, ke la lingvouzado en Esperanto estas malpli unueca ol en tiuj naciaj lingvoj, kun kiuj Esperanto konkuras por la rolo de mondskala komunikilo. UEA opinias, ke tiu relativa manko de unueco estas peza malhelpo al plia disvastiĝo de la lingvo. La Asocio konsideras, ke sukcesa disvolvo de Esperanto implicas ne nur terminkreadon sed ankaŭ lingvan normigon. TEC aktivas sur ambaŭ kampoj.

10. TEC-rekomendoj

UEA observas la rekomendojn de TEC en ĉiuj tekstoj, pri kies lingva enhavo la Asocio havas decidrajton.

Ĉ. VORTAROJ

11. Dulingvaj vortaroj

UEA instigas al la esperantistoj de ĉiu lando kompili Esperanto-vortarojn por sia gepatra lingvo, kun aparta atento al la specifaj terminoj de la kulturo kaj moroj en tiu lando. UEA prioritare klopodas certigi la ekziston de ampleksaj Esperanto-vortaroj por la plej vaste parolataj lingvoj de la mondo.

12. Unulingva vortaro

Nepras, ke la esperantistoj posedu modernan vortaron, verkitan ekskluzive en Esperanto, kiu:

- (a) registras kun difino ĉiun ĝenerale akceptitan vortradikon;
(b) informas pri ĝiaj gramatikaj karakterizoj; kaj
(c) ilustras, kiel tiu radiko estas uzata en la vortformado.

Tia vortaro estas *Plena ilustrita vortaro de Esperanto* (“PIV”). Tamen, kvankam majstra kompilaĵo en sia tempo, ĝi ne plu respondas al la bezonoj de la Esperanto-komunumo. Urĝe necesas prepari reviziitan eldonon aŭ bazi sur PIV freŝverkitan vortaron. UEA konsideras, ke

kompili tute novan vortaron ne estus prudenta uzo de la malabundaj leksikografaj rimedoj. Ĝi do favoras pretigon de reviziita PIV, kondiĉe ke:
(1) la revizio estos funda kaj plene spegulos la evoluon de la lingvo;
(2) ĝi atentos al aktualaj leksikografiaj metodoj;
(3) ĝi havos la kunlaboron de kompetentaj fakuloj pri la artoj, sciencoj kaj teknikoj; kaj
(4) ĝi laŭeble evitos difinojn specifajn al nur unu lando, regiono aŭ kulturo.
UEA volonte kunlaboros kun ĉiuj koncernatoj por efektiviĝi tian reeldonon.

REAGO

AL LA PROPONO PRI LINGVOPOLITIKO DE 24 FEBRUARO 1993

Dumviva membro de UEA kaj de preskaŭ kvin jaroj plentempa stabano en ties Centra Oficejo, mi tre entuziasmiĝis kiam mi legis pasintjare la rezolucion “Lingva evoluo: Strategio de UEA” aprobitan de la Komitato en Vieno. Kvankam ankoraŭ ŝajnas al mi bone ke la lingvopolitiko de la Asocio estu atentata kaj ellaborata, mi tiom malkonsentas kun la nuna propono pri tiu politiko, ke mi sentas min devigita publike kaj emfaze deklari mian kontraŭstaron al diversaj aspektoj de ĝi. Sciante ke mi tute ne estas sola en miaj kredoj kaj opinioj, kaj ke minoritata opinio rajtas almenaŭ esti aŭdata, mi nun komunikas miajn sentojn pri la propono al tiuj kiuj faros pri ĝi pluajn decidojn.

1. Statuso

Paragrafo 1 indikas la ĝeneralan celon de la propono: la difinon kaj starigon de deviga “starpunkto” kiu regu la mensojn de la laborantoj ĉe UEA. Bedaŭrinde por la propono, respekto (“Sento, kiun oni havas pri la alta kvalito de io, k kiu igas nin eviti ĝin atenci aŭ spiti”) simple ne povas esti ordonata. Ni povas “Havi ~on al io” nur kiam ni trovas ĝin inda je tio. Se tio mankas, nenio povas perforti la deziratan respekton. Se oni volas ordoni ion efektive ordoneblan, la verbo devas esti *observi* kaj ne *respekti*.

Leviĝas cetere iuj demandoj pri tiu monolita “starpunkto”. Unue, ĉu la starigo de tia deviga-por-ĉiuj sinteno estas nepre bona ideo en organizaĵo kiu mem konsistas grandparte el plej diversaj minoritatoj? Ĉu oni ne estas simple forpuŝanta ĉiun simpatianton kiu ne plene

dividas la ordonatan ortodoksecon? Eĉ se oni akceptas ke tia liber-limiga “starpunkto” indas, ĉu eblas ĝin difini adekvate en tia plurloke skiza dokumento kia la propono de 24 februaro? Koncizeco ja estas virto, sed la nuna propono ŝajnas tiurilate iom tro virta.

2. Apliko

La lingvopolitiko de UEA devus ne konsisti nur el cenzuro kaj svagaj terminologiaj projektoj, sed esti io pli larĝa, kio per enkonduko de novaj ĝeneralaj sintenoj de toleremo kaj intelekta rigoro igu la organizaĵon pli respektata. La apliko de tia lingvopolitiko ne estu afero pri kiu respondecu nur unu homo, sed prefere la tuta membraro de UEA. Eĉ se la lingvopolitiko restas difinita per la mallarĝa formulo de la konsiderata propono, troviĝas en ĝi neniu klarigo pri ĝuste kiel kaj kiomgrade la estrarano pri lingvaj aferoj “aplikos” la politikon. Ĉu li fariĝos la “lingvopapo” foje menciita en la Esperanta gazetaro, pli potenca ol la Esperantaj aŭtoroj, ol la redaktoroj kaj direktoroj de UEA . . . eĉ ol la Akademio de Esperanto kaj ties prezidanto? Ŝajnas ke jes, almenaŭ laŭ la skeleta paragrafo 2. Ĉu li estos alirebla okaze de ĉiuj lingvaj disputoj, kaj ĉu li povos tuj verdikti pri ili? Ĉu li kontrolos ĉiujn eldonaĵojn de UEA antaŭ ilia presado, por certigi ke ilia lingvaĵo konformas al la deviga lingvopolitiko? Ĉu li delegos sian potencon al iu alia por trakto de ĉiutagaĵoj? Se oni vere deziras superreganton ekster la Oficejo, ties efektiva aŭtoritato estu signife pli detale klarigita ol ĝi (ne) estas en paragrafo 2.

3. Nomo Esperanto

“Ne ekzistas, laŭ mia sperto ĉe la eldonaĵoj de UEA dum la lastaj jaroj, iu ajn atentinda provo ‘alinomigi’ Esperanton. D-ro Frank ja uzas la terminon ‘ILO’ por siaj propraj celoj en sia propra kunteksto, sed mi neniam ricevis la impreson ke li provas akceptigi tion ĉe UEA. Kaj ĉu Esperanto ja ne estas konstante nomata ‘la internacia lingvo’ fare de enorma nombro da UEA-membroj kaj aliaj esperantistoj? Ĉu ‘la internacia lingvo’ fariĝas cenzurotaĵo? Komprenoble ne. Kaj se iuj rajtas nomi Esperanton ‘la internacia lingvo’, kial aliaj ne rajtu nomi ĝin ‘ILO’ (kio estas nur mallongigo de tio) aŭ ‘interkultura’ aŭ ‘interetna’ se ili trovas tion pli taŭga?” Tion mi komence skribis pri paragrafo 3, simple ne sukcesante kompreni ke ĝi ja celas malestigi ĝuste tiun tradiciegan alinomon, “la internacia lingvo”, uzatan kredeble eĉ de plimulto de la kontribuintoj al la revuo tra la jaroj, inkluzive de prezidantoj, estraranoj, direktoroj, *Esperanto*-redaktoroj . . . Nu, mi apenaŭ estas amiko al la nomo (estis mi kiu senaprobe ŝanĝis “novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo” en la enhavaĝo de la revuo al “novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto” tuj kiam mi enposteniĝis, kaj daŭre malkidungon pro mia konstanta rifuzo malsukligi la nomon krom en pagitaj reklamoj), sed mi tamen kredas ke io tiom drasta, kio iras kontraŭ enradikiĝinta kutimo de tiom da esperantistoj (ĉu Zamenhof mem ne simile nomis sian lingvon?), devas esti prezentita en iom pli diplomatia maniero. Anstataŭ “UEA ne akceptas alinomigon de Esperanto”, oni povus diri ion kiel: “Kvankam individuaj esperantistoj rajtas nomi la lingvon laŭ sia persona prefero, en la eldonaĵoj de UEA ĝi ne estas alie nomata ol per la nomo Esperanto.” Por tuja klareco kaj malplia dogmeco, indus ŝanĝi ankaŭ la unuan frazon: “Esperanto ne estas la (sola) internacia lingvo, kvankam ja pli taŭga ol aliaj.” La pretendo estus pli milda, sed akirus preskaŭ ĉies senhezitan konsenton.

4. Oficiala lingvo

Kiam la enhavo de paragrafo 4 estis diskonigita al la CO-oficistoj post la februara estrarkunsido, ĉiuj simple ridis pri ĝi, trovante ĝin apenaŭ-kredeble stulta. La vero estas, ke jam neniu alia lingvo ol Esperanto estas parolata en la Oficejo, kun nur tre malmultaj esceptoj. La propono sugestas ke tio ne estas la kazo,

ke la oficistoj emas uzi aliajn lingvojn, kaj ke necesas iu regulo por devigi ilin al la aprobata praktiko. Krom esti ridinda, tio estas insulta, kaj donas la misan impreson ke homoj devas esti ordonataj por ke ili parolu Esperanton. Mi neniam parolis Esperanton pro leĝa aŭ kontrakta devigo, kaj mi ne komencos tion fari nun. Ĝis la lastaj du frazoj de paragrafo 4 estas forstrekitaj (kaj la lasta de paragrafo 5; vidu malsupre), kaj ĝis mi havas skriban certigon de la estrarano pri lingvaj aferoj ke mi rajtas ĉiam paroli kiun ajn lingvon mi volas, *krom telefone* (kaj foje dum paŭzoj, okaze de gastvizito, aŭ se mi momente forgesas) *mi ne parolos en la Centra Oficejo de UEA.*

5. Fundamento

Estas perfekte en ordo, komprenoble, ke UEA kiel supera instanco ne okupiĝu pri lingvo-reformo aŭ aliaj planlingvoj. Sed permesi ke fakasocio okupiĝu pri tio estas tute alia afero. Ĉu UEA okupiĝas, ekzemple, pri ateismo, goo, naturismo, ornitologio, sam-seksamo kaj vegetaranismo, simple ĉar ĝi akceptis kunlaborantajn asociojn pri tiuj fakoj? Evidente ne. Do, kial ĝi ne povus simile akcepti fakasocion de reformemuloj, sen okupiĝi pri ilia afero? Se akcepti fakasocion implicas okupiĝon, tiam UEA devas ĉesigi rilatojn kun ĉiuj religiaj kaj politikaj fakasocioj, por observi la statutan postulon de neŭtraleco, kaj kun preskaŭ ĉiuj aliaj, por ne “okupiĝi” pri io alia ol Esperanto mem. For Tutmonda Parolspuro-Asocio! For la dek kvar delegitoj pri interlingvistiko! For CED kaj LPLP! For CDELI! Restu nur AdE kaj TEC!

Aparte forstrekenda estas la lasta frazo de la paragrafo. Eble estus alie se aperus ajna subteno por la aserto pri “morala damaĝo”, sed la insulto staras nuda, atendante ke oni akceptu ĝin sen la plej eta pruvo aŭ eĉ indiko pri ĝia vereco. Ĉiuokaze mi asertas la kontraŭon: Se ekzistas homoj kiuj “morale damaĝas” la Asocion, ne estas tiuj kiuj volas plilarĝigi ĝian intelektan bazon, sed tiuj kiuj volas nur konfirmi kaj plioficialigi la jaman politikon, kiu ĝis nun venigis UEA nur al daŭra stagno kaj plena senefikeco. La nunaj gvidantoj de UEA – se juĝi laŭ la nuna stato de la Asocio kaj ties agado – neniel rajtas arogi al si moralan superecon.

6. Akademio

Mi ne havas ekzempleron de la Statuto de UEA antaŭ mi en la nuna momento, sed ŝajnas al mi ke la samaj aferoj pri la Akademio estas

tie diritaj. Eble la jama statuto estas nemenciita por eviti atentigon pri tio ke, almenaŭ ĝis nun, UEA *ne* estas kunlaboranta kun la Akademio en la maniero priskribita (la oficiala listo de landnomoj ankoraŭ ne aperis en la revuo, ekzemple). Se oni volas reaperigi tiun parton de la Statuto en la lingvopolitiko kaj eble tiel efektiviĝi ĝin ekde nun, bone. Mi rimarkas nur, ke (1) same kiel respekto, estimo ne kreiĝas per rezolucio; (2) la Akademiaj landnomoj daŭre ŝajnas bedaŭrindaj al mi kaj al multaj aliaj; kaj (3) kiam mi persone provis “konsulti ĝin en okazo de necerto pri iu lingva demando”, mi ricevis nur la informon ke la Akademio “neniam voĉdonis pri tiaj aferoj”.

7-8. Terminologio,

Terminologia Esperanto-Centro

Terminologia disvolvo povas esti taŭga prioritato de UEA – kompreneble inter aliaj, kaj eble ne en la unua rango – sed se “Esperanto ne povos realigi sian potencialon . . . ĝis ĉiu faka nocio esprimebla en nacia lingvo estos samprecize esprimebla en Esperanto,” mi timas ke Esperanto neniam realigos sian potencialon. Se temas pri *ĉiu* nacia lingvo, la anoncita fincelo evidente ne estas atingebla; kaj se temas pri nur unu, supozeble estas la angla – kaj mi ne vidas kiel senfina adaptado de ĉiufakaj anglaj terminoj farus aprezindan diferencon, krom eble ĉe la financa bilanco okaze de malprofita terminologia eldonado.

9-10. Lingvouzo, TEC-rekomendoj

La unua frazo de paragrafo 9 ŝajnas iom komika post la unuaj paragrafoj de la lingvopolitika propono. Estus pli bone forstreki tiun frazon, kune kun la komenco de la dua (mi, almenaŭ, ne “facile konstatas” la asertitan relativan malunuecon de lingvouzado en Esperanto), tiel ke la paragrafo komenciĝu: “Lingvouzado en Esperanto estas foje malpli unueca . . .” Mi ankaŭ rekomendas la forstrekon de “peza”, kiu ŝajnas troiga en tiu ĉi kunteksto. Pli pezaj malhelpoj estas plene ignorataj.

Evidente mankas aldonindaj detaloj en la tre mallonga paragrafo 10. En kiu formo venos la menciitaj rekomendoj? Kiom ofte? Kiuokaze? Ĉu oni sendos al TEC tekstojn por antaŭkontrolo? Ĉu ĝi eldonos terminarojn? Mi sincere bonvenigus normigajn rekomendojn de TEC, sed ŝatus legi ion pli specifan pri tio ol la nunan frazeton.

11. Dulingvaj vortaroj

Mi ne vidas kiel UEA povas “prioritate” klopodi “certigi” la ekziston de ampleksaj dulingvaj vortaroj por ĉeflingvoj, sen iel finance subteni ties eldonadon; kaj mi ne vidas ke tia financa subteno eblas. Kiam UEA kapablas eĉ ne eldoni katalogon por sia propra Libroservo, kiam ĝi lasas la mapojn fortranĉitaj de la Jarlibro malgraŭ fortaj protestoj de la ĉefdelegitoj, kiam la oficistaj salajroj plimizeriĝas, kiam oni daŭre parolas pri bankroto kaj maldungoj . . . kiel UEA povas “prioritate certigi” la eldonadon de vortaroj? Cetere, kiuj estus la favorataj lingvoj, kaj kiel elekti ilin sen ofendi la anojn de aliaj? Por mildigi la senton de ioma malrealeco, mi proponas la forstrekon de la vorto *prioritate*.

12. Unulingva vortaro

Nova PIV indas, sen ajna dubo. Sed paragrafo 12 bedaŭrinde donas ĉioman prioritaton nur al enorma, ĉio-enhava, multekosta vortarego. UEA laŭeble kontribuu al ties eldono, certe, sed kio pri nova *Plena vortaro*? Tio estas, kial la lingvopolitiko de UEA implicu ke simpla vortaro, sen ĉiu radiko sed ja kun granda plimulto de tiuj bezonataj por ordinara komunikado, ne simile indas je eldono nek estas subtenota de UEA? Parto de la respondo al tio ŝajnas troviĝi en tio, ke la propono estas verkita de iu kiu kredas ke manko de teknikaj terminoj baras la vojon al la plua disvastiĝo de Esperanto. Geknaboj en lernejoj, malriĉuloj en Ĉinio, ordinaruloj ĉie – tiaj homoj ŝajnas ne eniri lian konsideron. Eblas ankaŭ, ke la sistema elekto de lernebla kelkmilo da radikoj por vortaro de “baza Esperanto” povas tro soni kiel iuspeca lingvoreformo. Ĉiuokaze, mi proponas ke paragrafo 12 renomiĝu “Unulingvaj vortaroj”, kaj ke alineo pri nova baza vortaro, eventuale bazota sur pli ampleksa kaj kompleta, estu aldonita ĉe la fino de la paragrafo.

Tie finiĝas miaj komentoj, rekomendoj, kaj postuloj rilate la proponon pri lingvopolitiko. Mi ĝojas esti povinta fari iujn pozitivajn kritikojn kun specifaj sugestoj pri modifo, kvankam mia ĝenerala sento pri ĝi estas tre negativa. Se la plimulto de la membroj kaj gvidantoj de UEA ja kredas ke Fundamenta/Akademia Esperanto estas ideala, nepliboniginda sanktaĵo, ili devus fidi je la propra forto de tiu boneco, anstataŭ adopti rimedojn kiuj

memorigas pri diversaj diktatoroj, la Hispana Inkvizicio, kaj la cenzurisma reĝimo en kiu Esperanto mem naskiĝis. Sen ke la propono de 24 februaro estu draste modifita en detaloj kaj tono, ĝia akcepto fare de la Komitato de UEA reprezentus nur malbonon – ne tiom por la

ordonatoj kaj cenzuratoj, sed por UEA mem, kiu, per adopto de evidente tirana kaj sin-kontraŭdira politiko, perdis ankoraŭ pli de sia jam malmulta pretendo je akcepteble ĉe la ekstera mondo.

ROY MCCOY

KOMITATANOJ DE UEA EL LANDOJ KUN NOVO-MEMBROJ

Aŭstrio

S-ro Leopold Patek, Martinstr. 104/38, 3400 Klosterneuburg; tel. (02243) 669 82

Belgio

S-ro Marcel Delforge, Rue des Glacières 16, 6001 Marcinelle/Charleroi; tel. (071) 43 14 13
S-ro Alexandre Humet, Van Campenhoutstraat 4, 2600 Berchem; tel. [h] (03) 239 2169, [of] (02) 217 8163; telefakso (02) 217 5660
S-ro Grégoire Maertens, Pr. Leopoldstr. 51, 8310 Brugge; tel. (050) 35 49 35

Brazilo

S-ino Symilde Ledon, Caixa Postal 269, 12460 000 Campos do Jordão - SP; tel. (011) 62 1983

Britio

S-ro David Curtis, 7 St. Jude's Terrace, Weston-super-Mare BS22 8HB; tel. (0934) 622112
S-ro Geoffrey Greatrex, Exeter College, Oxford OX1 3DP; tel. (0600) 89 03 18
S-ro Ian Jackson, 29 Graham Road, Chiswick, London W4 5DR; tel. (081) 995 6244; telefakso (071) 726 8561
Prof. d-ro John C. Wells, 5 Poplar Road, London SW19 3JR; tel. (081) 542 0302; telefakso (071) 383 4108

Francio

D-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, 92220 Bagneux; tel. (1) 46 65 22 16
S-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, 91590 Cerny; tel. (1) 6457 6653

Germanio

D-ro Detlev Blanke, Otto Nagel Str. 110, 12683 Berlin
D-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, 21031 Hamburg; tel. (040) 738 45 08
D-ro Ulrich Lins, Gemarkenstr. 150, 51069 Köln; tel. (0221) 680 3250
S-ro Thomas Pusch, p/a GEJ, Rheinweg 15, 53113, Bonn 1; tel. [of] (0228) 253 898; telefakso (0228) 232 764
S-ino Elisabeth Schwarzer, Kaiserin Augusta Str. 75, 12103 Berlin 42; tel. (030) 751 38 75

Hispanio

S-ro Luis E. Hernández, Avda. Ramón y Cajal 122°C, 47011 Valladolid; tel. (983) 26 00 86

Israelo

D-ro Amri Wandel, Doar-Na Modiim, N-ro 767, 71908 Makabim; tel. [h] (08) 26 44 62, [of] (02) 584 417; telefakso (02) 584 437

Kanado

S-ro Yves Bellefeuille, 2372 Haddington, Ottawa, Ont. K1H 8J4; tel. (613) 731 3635
S-ro Mark T. Fettes, 3332 Cumberland St., Ottawa, Ontario K1N 7J2; tel./telefakso (613) 562 0785

Kubo

S-ro J. Hernández Angulo, Apartado 5120, 10500 La Habana

Nederlando

S-ro Hans Bakker, Kastelenstr. 231-II, 1082 EG Amsterdam; tel. (020) 642 18 53
S-ro W. F. Huppertz, Pelikaanhof 36, 2312 EB Leiden; tel. (071) 13 05 21
S-ro Danny ten Haaf, Witte de Withlaan 11, 2341 SP Oegstgeest; tel. [h] (071) 15 41 43, [of] (071) 27 55 28

Pollando

Mag. Andrzej Grząbowski, ul. M. Skłodowskiej-Curie 10/2, 85-094 Bydgoszcz; tel. (52) 41 51 44
S-ro Lech Kosieniak, ul. Piąkna 16b/9, 00539 Warszawa; tel. (22) 29 15 01

Svislando

S-ro Dietrich Michael Weidmann, Postfach 301, 8034 Zürich; tel./telefakso (01) 383 55 25

Usono

D-ro Sidney S. Culbert, 14833 39th Av. N.E., Seattle WA 98155; tel. (206) 3655509
D-ro Thomas Goldman, 7008 Milwood Road, Bethesda MD 20817; tel. (301) 229 4214
S-ro William R. Harmon, 1016 King Drive, El Cerrito CA 94530; tel. (510) 524-8261
D-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, University of Hartford, West Hartford CT 06117-0395; tel. [h] (203) 768-4417, [of] (203) 7684070; telefakso (203) 233-5463

Bajonetstraat 78
NL-3014 ZL Rotterdam
7 junio 1993

Al la Komitato de UEA

Estimata komitatano:

Antaŭ kelkaj semajnoj vi ricevis faskon da sendaĵoj de UEA, inter kiuj troviĝis propono pri lingvopolitiko verkita de la ĝenerala sekretario de la Asocio. Laborante en la Centra Oficejo, mi havis la okazon vidi tiun proponon nelonge post ol ĝi alvenis. Mi trovis min en tiom forta kontraŭstaro ke mi estis instigita verki reagon, kopion de kiu mi sendis nur al s-ro Jackson. Li neniel respondis, nek kiam mi skribis al li duan fojon, precipe por informi ke lia propono estas enkomputiligita tiel ke facile eblus iel modifi ĝin antaŭ ol sendi al la Komitato.

Certe ne mirigos vin, ke la ĝenerala sekretario ne akceptis ŝanĝon proponitan de CO-oficisto. Sed tio kio ja eble mirigos vin, estas ke li insiste sendigis sian senmodifan proponon malgraŭ malakcepto, ne nur de ĉiuj en la CO, sed de la Estraro mem. Laŭ informo konigita al la oficistoj, la Estraro eksplicite interkonsentis pri diversaj ŝanĝoj al la propono, tamen neniun el kiuj s-ro Jackson akceptis enmeti. Mi ne legis la protokolon de la lasta estrarkunsido kaj ne povas informi pri kiuj estis tiuj ŝanĝoj, aŭ pri kiom devigaj aŭ nedevigaj la estraranoj konsideris ilin; tio tamen ne estas afero kiun faru mi, sed la Estraro mem laŭ sia deziro kaj bontrovo.

Mi nek turnas min al vi kiel reprezentanto de la oficistoj (kvankam mi ne mis-reprezantas ilian starpunkton). Mi nur sentas min devigita komuniki mian propran kontraŭstaron pri la afero al la instanco kiu fine decidus pri ĝi. Por tion fari, sufiĉas ke mi sendu al vi kopion de la sama reago kiun mi komence sendis al la ĝenerala sekretario. Mi nur aldonas al ĝi la jenajn postnotojn:

1) Kiel ajna CO-oficisto konfirmos, mi efektivigis la “silent-strikon” anoncitan en miaj komentoj pri paragrafo 4 sur paĝo 2. Mia ĉe-labora silento daŭris iom pli ol unu monaton, kaj mi ĉesigis ĝin nur kiam Osmo Buller diris al mi ke en Valencio li persone parolos kontraŭ la lingvopolitika propono, kaj specife kontraŭ paragrafo 4. Mi fidis, kaj fidis, ke lia voĉo estos respektata; se okazos ke ne, kaj la Komitato aprobas lingvopolitikon kun io ajn simila al la nuna paragrafo 4, mi tuj resilientos. Estas ekster ĉiu emo kaj kapablo mia engluti tian regulon. Tio kio plej ofendas pri ĝi estas la impresoj donata de plena malsaĝeco.

2) Kiam mi verkis mian reagon al la lasta frazo de paragrafo 5, mi ne memoris paragrafon 18 de la Statuto de UEA: “Aliĝinta asocio aŭ individua membro, kiu evidente kontraŭlaboras la celojn de UEA, morale aŭ materie damaĝas ĝin, aŭ ne kontentige plenumas siajn devojn al ĝi, povas esti eksigita el la Asocio. . . .” Kiel iu rimarkis al mi poste, tio en la lingvopolitiko pri “morala damaĝo” estis ŝajne metita kun ia plano pri eksigo. Nu, bonege. UEA, kiu ĵus fiaskis ĉe sia feblega membromarkampanjo, nun komencu forpeli siajn jam relative malmultajn membrojn. Laŭ ĉiu atestaĵo videbla antaŭ miaj okuloj, la afero farota nun de UEA estu plilarĝigo de sia ideologia bazo, kaj ne plistriktigo ĝis punkto kie ĝi fariĝas akceptebla al preskaŭ neniuj.

Io kio igas la aferon des pli bedaŭrinda, estas ke ekzistas dubo ĉu s-ro Jackson eĉ plene kredas je sia propra propono. Li diris al mi en la CO ke li celis produkti en la lingvopolitiko ion kio esprimos la volon de la plimulto el la membroj – do, ne necese lian personan opinionon. Li konfidis al mi ke li taksas la supersignojn efektiva baro al la disvastigo de Esperanto, kaj ke UEA volontege “kurus” al ajna UN-konferenco pri lingvoreformo. Se estas tiel, kial li lanĉas inkvizicion kontraŭ tiuj kun kiuj li samopiniis – nur malaperte – kaj kiuj kun enorma pravigo simple ne kapablas plu fidi je UN pri ajna afero planlingva?

Ĉiuokaze, mi denove pledas ke la lasta frazo de paragrafo 5 estu forstrekitita. Kiu ajn estu la motivo malantaŭ ĝi, tio ke esperantistoj – kiuj mem estas ĉiuj lingvaj reformistoj – forpele agu kontraŭ tute samcelaj homoj, kiuj cetere subtene anas al la sama organizaĵo, ŝajnas ridinda kaj absurda.

3) Mi emas repreni mian proponon ke paragrafo 12 renomiĝu “Unulingvaj vortaroj”, kaj ke alineo pri nova baza vortaro estu aldonita ĉe ties fino. Ne estas ke mia opinio vere ŝanĝiĝis, sed nur ke ŝajnas tro fantazie imagi ke la nuna UEA povus produkti ne nur unu, sed du gravajn vortarojn. Eble la paragrafo ja nomiĝu “Unulingva vortaro”, sed kun teksto modifita tiel ke: a) la reeldono de PIV estu lasata al SAT, kiu jam entreprenis ĝin; kaj b) la vortaro efektive produktota de UEA estu principe baza kaj malmultekosta.

Mi dankas al vi vian konsideron, kaj deziras al vi sukceson ĉe viaj kongresaj laboroj.

Estime salutas

Roy McCoy
CO-oficisto
Dumviva Membro